Laŭzana Esperanto-Societo
Februaro 2022 - n-ro 1

# Laŭzana informilo

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe: **eventaservo.org/o/LES**

## *Venontaj kunsidoj:*

- Ma, la 1an de marto *Decidota*
- Ma, la 5an de aprilo *Decidota*
- Ma, la 3an de majo *Decidota*
- Sa, la 18an de junio *Ekskurso*

**! ! ! ! ! ATENTU LA DATON ! ! ! ! !**

## Marde, la 1an de februaro 2022

**je la 20a en *Espace Dickens* en Laŭzano**

# Ĝenerala Asembleo

## Charlie Chaplin, Gandhi, Albert Einstein kaj la aliaj



*Vestaĵoj Malnovaj*

En la filmo « La Diktatoro » de 1940 Chaplin utiligis esperanton kiel lingvon por la vendejaj ŝildoj de la judejo por ne skribi ilin jide aŭ hebree.

Cetere la regisoro devigis la aktorojn diri la dialogojn en la internacia lingvo.





« Charlot » amikis intime kun multaj esperantistoj kiel Gandhi kaj Albert Einstein. La fama sciencisto svisa, nobelulo, vigle subtenis nian lingvon; en 1923 li eĉ konsentis honore prezidi kongreson en Germanio. Li asertis: *"Por interhoma komunikado kaj por internacia kompreniĝo la helpo de esperanto ne nur necesas, sed perfekte taŭgas".*


## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com … *esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2021-2022**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

**Babilada Rondo je la 19a**



jaŭde
la 10an de februaro
**ĉe Maryse Tissot**
079 405 71 76
Route de St-Légier 20a, Vevey
maryse.tissot@bluewin.ch



jaŭde
la 24an de februaro
**ĉe Francisko Randin**
076 411 14 55
Vallombreuse 14, Laŭzano
info@dannir.ch



Kuracarto konsistas en distrado de la malsanulo, dum la naturo kuracas lin.


Voltaire




Ĉiu momento, kiun vi bone utiligas, estas trezoro, kiun vi gajnas.

Don Bosco




Rakonto en 5 historioj verkitaj de 13 el niaj membroj.

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO

*versio C, parto 4*

En la ĉambro de Luko ni interŝanĝas: *«Nun ni certas, ke ni ne revis. La “Blanka Damo” vere ekzistas. La popola legendo veras»,* diras Klara. Luko daŭrigas: *«Mi estas trankviligita; mia onklo pravis kaj vivis la saman sperton.»* Klara kiel ĵurnalistino tute ekscitiĝas: *«Morgaŭ ni scios la solvon de tiu mistero.»*

Ni, la “tri enketistoj”, resonorigas ĉe la kastelpordego. Kiel hieraŭ, la ĉefservisto bonvenigas nin. Nun li diras: *«Mia Mastro atendas vin, bonvolu sekvi min.»* Li kondukas nin en grandegan antaŭĉambron kaj foriras. Klara tuj ekparolas: *«Lasu min ludi mian ĵurnalistan rolon.»* Luko, timema, respondas: *«Jes prave, ni nur aŭskultos.»* La pordo brue malfermiĝas malrapide kaj aperas viro sesdekjara, kun blanka kaj longa hararo, rondaj okulvitroj nigraj, vestita de rajdaj pantalono kaj botoj. *«Bonvenon en mia kastelo, posedaĵo de nia familio ekde 1612. Mi prezentas min: Grafo Mikaelo de Glerolo. Kion mi povas fari por vi?»* Klara komencas: *«Mi estas kanada ĵurnalisto. Mi enketas pri svisaj kasteloj.»* Ŝi montras la foton al la grafo: *«Ĉu tiu estas via kastelo?»*

Li prenas enmane la foton kaj palpebrumante li snobe deklaras: *«Bonvolu pardoni min, mi devas ŝanĝi miajn okulvitrojn.»* Li viŝas ilin kaj plu rigardas: *«Jes, veras, estas mia kastelo antaŭ dudekjaroj. Mi rekonas ankaŭ tre bonan amikon, pri kies nomo ... mi ne plu bone memoras.» «...Filipo kun sia hundo Lajka»*, laŭte ekkrias Luko kontenta esprimi sin. Subite la grafo levas la okulojn al ni kaj re-normaliĝas el sia esprimmaniero tute emociita: *«Kiel vi scias tion?» Luko ekrespondas: «Estas mia onklo, la frato de mia patrino.»* Post silento la grafo rerigardas la foton. *«Filipo estis por mi amiko tre fidela. Post la malapero de mia fratino kaj la morto de miaj gepatroj mi imagis ne plu povi vivi post tiu grandega ĉagreno. Filipo ĉiam miaflanke ĉeestis por subteni min.»* Nia grafo diskrete sekigas siajn okulojn.

Ni estas invititaj sidiĝi en granda salono. La kastelmastro proponas al ni kunmanĝi kaj, sen atendi nian jeson, petas al la ĉefservisto alporti aperitivojn. *«Estas tre granda honoro kaj plezuro ricevi en mia hejmo familianojn de Filipo. La informo de la malapero de mia kara amiko remergigas min en doloran tempon kaj samtempe feliĉegan epokon kun li. Tre ofte Filipo pasigis libertagojn enkastele kaj iam, kiam li ĉeestis, la restoraciestro venis peti la permeson lumigi la kastelon por valorigi ĝin. Plie la estro ankaŭ proponis lumajn projekciaĵojn surlage por sia klientaro.*

*Nun estas mia filo, kiu posedas la “Blankan Ĉevalon”. Li pli bonigis la “spektaklon” pere de holografiaj teknikoj. Hodiaŭ lia restoracio tre tre famas tutmonde pro la fantomoj de la lago.»*

FINO

# Intervjuo de Denis Maret, membro de LES

(Fare de Francisko)



*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis la 21an de februaro 1965 en Martigny. En Monthey mi metilernadis kiel vendisto de nutraĵoj. En 2000 mi malsaniĝis kaj parte blindiĝis. Mi nun laboras en nacia asocio pri helpo al ĉiuj handikapuloj. Antaŭ 35 jaroj mi renkontis mian edzinon Sylviane; ni loĝas nun en Monthey en la valeza “Chablais”.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**En jutubo mi malkovris videon, kiu rakontas la vivon de Zamenhof.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Mi tuj aliĝis al la retaj kursoj de *edukado.net* kaj sekvis ilin dum 4 monatoj. Kiam mi aŭdis Francisko-n paroli pri filmo en «Forum» (RSR) mii tuj kontaktis lin. Poste mi partoprenis la kursojn de Cléa en la *Popola Universitato.* Sylviane iom studas.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Mia familio kaj miaj amikoj rigardis min bizare ne sciante, kio estas esperanto.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Mia nepino Loriane dujara aŭdas esperanton de mi ekde sia naskiĝo.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Mi ankoraŭ neniam partoprenis kongreson. Tamen estis grandega momento por mi aktori blindulon en la filmo *“La Sekreta Vilageto”* kaj speciale vivi la simpatian kaj amikan etoson dum la filmado en *La Sage*. Restas mirinda memoraĵo en mia kapo.**